# Rafael Correa: ni protektu la oceanajn pasejojn.

La ekvadora prezidento Rafael Correa, alvokis siajn latinamerikajn homologjn protekti la oceanajn pasejojn kaj batali kontraŭ la malleĝa fiŝkaptado, okaze de interkonsento farita por difini la marajn limojn inter Kostariko  kaj Kolombio.

Correa emfazis ke kiel gvidantoj de tiuj landoj ili havas unikan kaj urĝan okazon ebligi al la estontaj generacioj povi ĝui oceanon tiom riĉan.

Correa insistis pri la bezono protekti la naturan heredaĵon kaj ĝin  mastrumi respondece por garantii la daŭrigeblon de la rimedoj.